

Bureau Français de la Paix  
6, Rue Favart, 6  
PARIS

Paris, la 17<sup>a</sup> de mayo 1897

Estim'at'a Sinjor'o.

Mi hieraŭ send'is al vi la lern'o'libr'o'n de la lingv'o inter'naci'a, kaj skrib'is al Sinjor'o de Beaufront por ke li send'u al vi la Ekzerc'ar'o'n kaj la Vort'ar'et'o'j'n kiu'j'n vi pet'is. Mi est'as cert'a ke vi sent'os grand'a'n plezur'o'n lern'ante tiu'n lingv'o'n. Vi sen'dub'e pens'os, kiel mi mem, ke D<sup>ro</sup> Zamenhof don'is al la hom'ar'o la plej mir'ind'an kompren'il'on inter'naci'a'n!

Se mi prav'as pens'ante tiel, mi dev'as propon'i al vi rimark'o'n. Neniam

libr'o pri la Esperanto ekzist'as ĝis nun por la Hispan'o'j! Kaj tiu, kiu kon'ig'os via'j'n kun'land'an'o'j'n pri la lingv'o, far'os al ili la plej grand'a'n serv'o'n. Ĉu vi ne pov'us, aŭ traduk'i la lernolibron vi mem, aŭ konsil'i ian inter via'j' lern'ant'o'j' je entrepren'i tiu'n traduk'o'n?

La traduko dev'us esti far'at'a de la libr'o de S<sup>ro</sup> de Beaufront, kiu'n mi send'is al vi; ĝi est'as mult'e pli bon'a ol la unu'a libr'o por la Franc'o'j, kiu est'is far'it'a je la komenc'o de S<sup>ro</sup> Zamenhof mem, sed kiu ne est'is repres'at'a.

La libr'o'j por la ceter'a'j naci'o'j est'is traduk'at'a'j de tiu unu'a libr'o, sed nun ~~ne~~ la verk'o de S<sup>ro</sup> de Beaufront est'as la libr'o-model'o. — Ver'simil'e ĝi est'os traduk'at'a en lingv'o'n magiar'a'n

de <sup>ŝ</sup>ro Balintha, instru'ist'o ĉe la  
Universitat'o de Koloŝvar, Kiu'n mi  
al'ig'is al la lingv'o.

Vi far'us plezur'on al mi,  
skrib'ante al <sup>ŝ</sup>ro d. Beaufront, aŭ  
al <sup>ŝ</sup>ro Zamenhof, ke vi est'is  
al'ig'at'a al la lingv'o per mi'a  
artikol'o. Zamenhof el'don'as  
nomar'o'j'n de la nov'a'j esperantistoj,  
kaj vi kompren'as kiel interes'e  
estas, ke ĉiuj est'as nom'at'aj en  
tiu'j « Adres'ar'o'j ».

Ricev'u, ŝanĝo, mian kor'an  
saluton



G. Moch



UNIVERSIDAD  
DE SALAMANCA

GREDO.USAL.ES